

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Memoro

tradukita de Manfredo Ratislavo

1

Susuradas foliaro,
 Flugas birdo en la for';
 Fluas akvo de l' montaro',
 Hejmen tiras min la kor'.

Laste, dum mi song'is iel,
 La hejmlandon vidis mi;
 Ĝi min salutadis tiel!
 Ploris mi pro tio ĉi.

Tie ĉi en fremda lando,
 Homoj, domoj, ĉio ĉi,
 Marbruado ĉe la strando,
 Song'a ŝajnas ĝi al mi.

2

La foraj hejmaj montoj,
 La alta kvieta dom',
 La susurantaj fontoj
 Kaj kelka amata hom',
 La gekaruloj ĉiuj,
 Gefratoj kaj patrin',
 salutas ree tiuj
 En luna nokto min.

*Traduko de la Germana poemo "Erinnerung" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-04-23.*

MR-091-2 / Arg-232-458 (2004-04-23 11:58:56)